

Intervjuo kun Claude Piron (1),
kiu ricevis premion «plej bona originala libro por la jaro 1976»,
kaj lia kanzono *Sur kampo florkovrita*

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 727, 1977.09.14 & 16 & 17

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/SRI-1977/Radioprelego_727_1977_09_14_16_17_Claude_GACOND_Intervjuo_kun_Claude_Piron_1_kiu_ricevis_premion_plej_bona_originala_libro_1976_kaj_lia_kanzono_Sur_kampo_florkovrita.pdf

Cl.- Parolas Claude Gacond. Mi havas hodiaŭ la neordinaran okazon komenci intervjuŝerion kun la verksito kaj poeto, Claude Piron, kiu ĵus ricevis premion «plej bona originala libro por la jaro 1976».

La pasintan someron vi estis invitita partopreni la TEJO-Kongreson en Poitiers, ĉar tie Literatura Foiro proklamis la rezulton de voĉdonado pri la verko de la jaro. Kaj ĝuste vi, Johán Valano, ricevis la unuan premion. Estas fakte dank' al la perradiaj recenzoj, kiujn ni faris, ke Literatura Foiro povis scii, ke Johán Valano kaj Claude Piron estas la sama persono. Kion vi opinias pri tiu ĉi honorigo ?

CP.- Nu, kiel mi diris en Poitiers, la unua ideo, kiu venas al mi estas, ke tio montras la ne tre altan nivelon de la esperanto-literaturo, aŭ almenaŭ de la originala esperanto-literaturo.

Cl.- Sed, ĉu vi ne troigas, tamen ?

CP.- Eble mi troigas. Mi volas diri, ke se oni komparas nian esperanto-literaturon kun la grandaj naciaj literaturoj, ni povas diri ke la fakto ke tia verko estis voĉdonita kiel *la* verko de la jaro, montras ne tre altan nivelon. Sed, se kompari kun la literaturoj de malgrandaj nacioj, mi pensas, kvankam estas tre malfacile por aŭtoro juĝi mem la propran verkon, mi tamen pensas, ke ĝi staras sur akceptebla nivelo, ni diru.

Cl.- Tamen, via verko superis la aliajn pasintjarajn verkojn rilate al lingvaj kvalitoj, kiujn ni eĉ siatempe menciis en nia recenzo. Interalie, tiu ĉi provo marki la akcentitan vokalon de apostrofitaj substantivoj per akcenta signo sur la koncerna vokalo, prefere, ol per apostrofo anstataŭanta la mankantan 'o'-vokalon. Vi eble vin esprimu tiurilate.

CP.- Do, mi eble devas diri unue, ke mi tre ŝatas la sistemon de eliziado en la internacia lingvo. Mia opinio Esperanto povas fariĝi tre malbela, se oni uzas tro multajn substantivojn. Bela stilo en Esperanto lasas grandan lokon al verboj, adverboj kaj adjektivoj. Kaj bela prononco estas tia, ke ni ne tro forte aŭdas la 'o'-finaĵon. Tamen kelkfoje okazas, ekzemple en administra, scienca aŭ jura teksto, aŭ en titoloj ĉefe de neliteraturaj tekstoj, ke estas nenia maniero elturni sin. Kaj, ĉar eliziado estas ebleco oficiale permesita en la Fundamento, kial ne uzi ĝin pli ? Mi ne diras, uzi ĝin multe ; mi ne diras, uzi ĝin konstante, sed simple uzi ĝin pli. Sed en skribita teksto, se ĉiufoje, kiam oni uzas elizion aperas apostrofo, la aspekto ne estas tre bela. Kaj tial mi proponis tiun sistemon.

Cl.- Kiajn avantaĝojn vi vidas en la elizioj en Esperanto?

CP.- Mi pensas, ke oni povas kalkuli tri. Unuflanke, ĝi evitas troan monotonecon. Ekzemple en titolo de administra teksto kiel "Raporto de la subkomisiono al la komisiono pri la juro de la maro". Tio inkluzivas tro multajn 'o'-finaĵojn. Kaj se vi diras : "Raporto de la subkomisión

al la komisiono pri la juro de la már”, vi tion evitas. Due, ĝi igas la frazon ritme pli vigla, ebligante fini frazparton aŭ prepozicion per akcentita silabo. Mi prenas alian ekzemplon el la ĉiutaga vivo. Ŝajnas al mi ke formuloj, kiel « sinjór doktoro » aŭ « sinjoro doktór » estas pli belaj ol « sinjoro doktoro ». Kaj trie, kaj tio ne estas la malĉefa, se tiu sistemo estus alprenita en la ĝeneralan lingvouzon, ĝi proksimigus la ĝeneralan lingvon al la lingvaĵo de poezio kaj kantoj, kiuj tiel fariĝus pli rekte kompreneblaj. Kaj tio estus tre granda avantaĝo, ĉar mi opinias, ke se la esperantoparolanta publiko ne tre ŝatas poezion, kaj ankaŭ havas malfacilaĵojn kompreni kantojn, tio ŝuldiĝas grandparte al tiu sistemo de eliziado, kio ne estas sufiĉe kutima al ĝi.

Cl.- Ĉu, fakte la ideo enmeti dialekton en la romana rakonto estis iel rimedo influi la legantaron ?

CP.- Certe, jes. Estas la direkto, en kiun mi ŝatus ke evoluu la internacia lingvo.

Cl.- Vi aŭdis el Svislando intervjuon de Claude Gacond kun la kantotradukisto, Claude Piron. La venontajn semajnojn ni daŭrigos tiun ĉi intervjuerion. Jen konklude la kanzono «Sur kampo florkovrita», kiun Claude Piron tradukis. Ĝis reaŭdo!
(*sonas la kanto*)

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2013